


# BONA ESPERO

Cirkulero 40 por la amikoj kaj subtenantoj de "Bona Espero" r.a., prezidanto: s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626



Karaj amikoj kaj subtenantoj,

Nordwalde, 94-10-25

por la neĉeestintoj de nia **membrokunveno en Kiel** unue la plej grava: niaj financoj estas stabilaj. En la kunveno partoprenis pli ol 30 Esperantistoj, inter ili 14 membroj (pluraj spontane membriĝis) de nia societo. Oni unuanime akceptis la kasraporton, kies ĝustecon atestis du revizoroj, kaj la buĝeton por 1994. Same unuanime oni akceptis proponon, postuli de s-ino Sera Genovese kaj de prof. d-ro Giordano Formizzi, retiri siajn akuzojn kontraŭ ges-roj Grattapaglia kaj skribe peti ties pardonon. Laŭ niaj informoj tio ĝis hodiaŭ ne okazis. Prof. Formizzi eĉ ne kuraĝis, veni al Kiel, kien Germana Esperanto-Asocio invitis lin kiel festprelegonton, sed nuligis sian aliĝon, timante demandojn de ni pri la objektiveco de liaj riproĉoj. Sekve nian raporton, kies resumon vi ricevis, la estraro de Germana Esperanto-Asocio oficiale konstatis, ke la akuzoj kontraŭ la gvidantoj de "Bona Espero" estas kontraŭpruvitaj kaj tiel informis nin. Per tio ni volas fini tiun hontindan ĉapitron, ĉar ni havas pli gravajn taskojn ol elĉerpi niajn fortojn per kontraŭpruvado de senbazaj kalumnioj. - Mi mem ekzemple elspezis multajn vesperojn, por kompili unu-du-horajn **diverstemajn videofilmojn** el la ampleksa materialo, kiun mi hejmenportis post nia restado en Brazilo. Cetere, tiuj videokasedoj estas prunteblaj. (Atentu tamen, ke la poŝttarifoj en Germanujo estas terure altaj; sendi videokasedon al eksterlando, kostas 9 gld. da afranko!). -

Nia plej freŝa kaskontrolo havis la ĝojindan rezulton, ke **vi donacis ĉi-jare jam pli ol 18.600 GM.** Tio estas vere grandioza. Pluraj el vi meritas specifan dankon, sen mencii nomojn: ili uzis jubilean naskiĝdatrevenon aŭ alian festotagon por peti la gratulantojn, donaci monon por "Bona Espero" anstataŭ ion alian. En Dortmund-Aplerbeck kultura centro havis eĉ tutsemajnan aranĝon kaj transdonis la gajnon al nia trezoristo. Pluraj kolektaĵoj de vestaĵoj plenigis dekduon da pakajoj, kiujn la familioj Schönberner kaj Fischer komence de julio transportis al Bonn. De tie estis subita, senpaga (!) eblo, ekspedi la pakajojn al Brazilo. -

Post nia alvoko, financi la partoprenon de pliaj infanoj en la **Brazila Esperanto-Kongreso en Natal**, bonkora geedza paro en Kiel spontane donacis monon por 3 lokoj: la feliĉaj infanoj el "Bona Espero", kiuj tiel krome povis kunveturi, estis (laŭ niaj proponoj) Leandro, Lidia kaj Ursula. Per tiu donaco ges-roj Grattapaglia vidis sin kvazaŭ "premitaj", organizi **grandan karavanon per ambaŭ kombioj** (do ankaŭ per la malnova, 8jara). Entute 17 personoj spertis tiun aventurecan vojaĝon kun distanco de pli ol 3.500 km por unu vojo. Krom la admirindaj kaj bedaŭrindaj ŝoforoj Ursula kaj Giuseppe kunveturis: Adarci, Sara (vidu nian cirkuleron 39an), Violetta (juna helpantino el Paderborn, Germanujo) kaj 12 infanoj, inter ili Amanda, Rosamira kaj Marilda, la tri knabinoj el Brasilia (vidu sube). Dum ilia foresto "regis" en "Bona Espero" instruistino Nivea kaj Germano, konata al ni, kiu jam delonge vivas en Brazilo. Laŭ la detala raporto de Ursula la vojaĝa provizo konsistis el: sakoj kun bananoj kaj oranĝoj, 12 grandaj panoj, 5 fromaĝoj, 600 membakitaj biskvitoj, littukoj kaj 17 personaj багаĝeroj. La ĉielo scias, kiel ĉio trovis lokon en nur du aŭtoj.

Por ŝpari bankkoston, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z", sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!  
Se nek vi estas UEA-membro, nek UEA havas konton en via lando, giru al jena poŝtkonto: kontoposedanto "Bona Espero", D-48356 Nordwalde  
Konto: 2033 99-465 Postbank Dortmund (bankkodo 440 100 46)

La itinero tuŝis la urbojn Montes Claro, Minas Gerais, Itabuna, Bahia (tie aliĝis Flavio, la kuracisto el Brasilia, kun sia familio), Aracuja kaj Sergipe. Fine ili atingis Recife, kie ĉiuj gastis ĉe s-ino Neuza Esteves Araujo, kunfondintino kaj estraranino de la societo "Bona Espero"/Brazilo. Ĉe la strando de Olinda la infanoj la unuan fojon en la vivo spertis la maron, certe neforgesebla evento por ili. S-ino Esteves Araujo akompanis la karavanon iom "triumfe" kaj fiere al la nacia kongreso.

Ni dankas ankaŭ al Esperanto-amiko el Dortmund, kiu flugante al Natal bonkore kunportis monon, dorsosakon kaj pliajn utilajn donacojn por la Bon-Esperanoj. Li ankaŭ transdonis ekzemplerojn de nia kompleta, pli ol 30paĝa raporto pri la kampanjo kontraŭ ges-roj Grattapaglia al ili mem kaj al Brazila Esperanto-Ligo. Intertempe la redaktoro de Brazila Heroldo vizitis "Bona Espero" kaj propraokule spertis ties staton. Ni esperu, ke li post tio helpas konvinki la skeptikemulojn inter la Brazilanoj. Estas ege dezirinde, ke troviĝos dum la venontaj jaroj posteuloj por ges-roj Grattapaglia, nepre Esperantistoj, se eble Brazilanoj.

La 14an de julio estis unika jubilea tago: antaŭ 20 jaroj ges-roj Grattapaglia venis al Brazilo! Jen devus sekvi laŭda prelego. Anstataŭe - certe laŭ la deziro de la laŭdinduloj - ni uzas la malmultan lokon en tiu ĉi cirkulero por pliaj raportindaĵoj. Fotoj pli trafe rakontas, kiom bone prezentis sin la infanoj el "Bona Espero" dum la kongreso en Natal, ekzemple per memverkita teatraĵo "vendistino de revoj". Multe pli poste ĉiuj sanaj, sed elĉerpitaj revenis hejmen.

Ĉe-loke Giuseppe komencis plifortigi la digon de la rezervuja lago per ŝtona muro. Ĉiujare la inundo dum la pluvsezono difektas la digon, kiu estas nur el tero, tiel ke ĝi intertempe minacis disfali. La seka periodo ĉi-jare estis terure longa, la unuan pluvon la Bon-Esperanoj salutis ĝoje.

#### "Bona Espero" - elstara reklamo por Esperanto

Inter la kritikantoj de "Bona Espero" estas ankaŭ voĉoj, kiuj asertas, ke ĝi forsuĉas tro da fortoj kaj mono de la movado kaj tiel malhelpas al Esperanto. Proprasperte ni povas aserti la kontraŭon. Ni partoprenis per informstando pri "Bona Espero" en la somera festo kun ne-Germanaj vilaĝanoj hejme en Nordwalde. Dum interesatoj informiĝis pri la vivo en "Bona Espero" neeviteble venis la demando: "Kaj kiel vi interkomunikiĝas tie?". Tiel raporto pri "Bona Espero" ĉiam vekas miron pri la praktikaj aplikobloj kaj pri la okulfrapa funkcio de Esperanto. Ne malmultaj el niaj konatoj lernis Esperanton nur pro "Bona Espero", kaj tiu nombro daŭrkreskas. Ankaŭ ges-roj Grattapaglia raportis, ke Esperanto disvastiĝas inter iliaj vizitantoj: pluraj Germanaj turistoj, kiuj hazarde venis al "Bona Espero", nun hejme serĉas kontaktojn al Esperantistoj. La universitato de Brasilia planas fakultaton pri "ekologikonforma teĥniko" en Alto Paraiso, ankaŭ kun socia temaro. Pro bonaj kontaktoj al gravuloj, Esperanto povos supozeble ludi certan rolon en tiu kadro.

#### Momente nur tri knabinoj en Brasilia

Kiel ne-pozitivan rezulton Ursula Grattapaglia raportas, ke Adelia, unu el la knabinoj en Brasilia, ne daŭrigis sian studadon kaj edziniĝis al filo de najbaro en sia devenloko. Ni opinias tamen, ke ŝia plustudado certe ne estis senrezulta. Ankaŭ edziniĝo estas bona starto de propra vivo, kiun ebligis "Bona Espero". Tial ni estas kontentaj. Cetere (laŭ nia interkonsento) la knabinoj en Brasilia ricevis novajn (kvankam uzitajn) litojn kaj fridujon. Plie ni volas zorgi, ke la knabinoj povu pagi bezonatajn librojn kaj busbiletojn por viziti la studlokojn (Brasilia estas nekredeble granda). Ni krome vidas problemeton por la estonto, kiam knaboj el "Bona Espero" ŝatus plulerni en Brasilia: kie ili loĝu? "Bona Espero" el nia vidpunkto bezonas fidindajn junajn virojn. Clarimundo ("Tota") kaj Joao faras jam bonan impreson. Kaj ĉu ne estus salutinde kaj nature, se el inter la infanoj de "Bona Espero" ankaŭ foje ekiĝus juna familio? - Clarimundo ĵus spertis en Brasilia komplikan operacion, kiun faris Flavio (vidu supre). Bonŝance Tota estas jam resaniĝanta.



Parto de la  
karavano al Natal  
supre en la mezo:  
s-ino Neuza  
Esteves Araujo

Teilnehmer der  
Karawane nach  
Natal  
oben, Mitte:  
die Gründerin,  
Frau Neuza  
Esteves Araujo

Junaj viroj de "Bona Espero":  
Joao, Clarimundo, Leandro  
(de maldekstre)

Junge Männer aus "Bona Espero":  
Joao, Clarimundo, Leandro  
(von links)



Prezentajo en Natal:  
"danco de la naturo", kun  
Adarci, Andreia, Brigida, Sara  
(de maldekstre)

Für den Kongreß in Natal:  
"Tanz der Natur", von  
Adarci, Andreia, Brigida, Sara  
(von links)

## Buĝeto 1994a laŭ propono de "Bona Espero", akceptita en Kiel

### Kurantaj elspezoj:

Nutrado, foruzata materialo, riparoj	5.000 \$
salajroj (2 instruistinoj, 1 kuiristino, 1 helpanto)	2.000 \$
<b>Eksterordinaraj elspezoj:</b>	
plukonstruado de la "domo de la helpantoj": (tie loĝas la instruistinoj kaj helpantoj/gastoj; krome 1 alon konsistigas la instrumetiejo)	5.000 \$
<b>Celfiksita rezervoj:</b>	
konstruado de kurenta konekso	10.000 \$
funkciigo de la instrumetiejo (instruado, maŝinoj)	2.000 \$

De tiuj entute 24.000 \$ ni jam transdonis 17.000 \$. La reston ni retenis en Germanujo, por eviti la inflacion en Brazilo, kiu cetere havas refoje novan valuton, la "Realon". La konstruado de la nova kurenta linio, de Alto Paraiso al najbara vilaĝo, preter monto Zamenhof, do nur 2 km for de la centro de "Bona Espero", ankoraŭ ne komenciĝis, eble en decembro. Nur post la kurenta konekso povos refunkcii pluraj maŝinoj en la metiejo. La malnovan generatoron ja neripareble detruis fulmo.

### Financa perspektivo

La estraro opinias, ke la supraj eksterordinaraj projektoj estu provizoj la lastaj en "Bona Espero"; necesos tamen ankoraŭ la alkonstruo de pliaj du klasĉambroj. Tiu sinteno rezultas unuflanke el la limigita nombro de laborfortoj en "Bona Espero", aliflanke el la amplekso de la atendeblaj donacoj, per kiu pagendas ja ankaŭ rezervoj por neeviteblaj eksterordinaraj riparoj kaj aĉetoj (ekzemple de nova kombio ĉ. ĉiun 8an jaron). Dum tio ni jam enkalkulis la subvenciojn de la ŝtato Goias kaj de la urbo Alto Paraiso, kvankam ili nur malregule pagas (ĉi-jare nur por 5 monatoj).

### Estraranoj denove vizitos "Bona Espero"

Kelkaj el ni planas, denove (proprakoste) flugi al "Bona Espero". Datoj: tienflugo ĉ. la 12a de marto kaj la 2a de aprilo, reflugo ĉ. la 2a de aprilo kaj la 23a de aprilo 1995a. Restado eblas do dum 3 aŭ 6 semajnoj. Eblos kunflugi laŭ jenaj kondiĉoj: Celo de la restado ne estas feriadi, sed kunvivi la normalan ĉiutagon de la Bon-Esperanoj, t.e. ankaŭ transpreni laborojn. Krome ni pagos por niaj manĝoj, ĉar la buĝeto ne antaŭvidas gastigadon de portempaj helpantoj. La interhomaj rilatoj al la Bon-Esperanoj kaj la bela naturo estas laŭ nia sperto abunda rekompenco. Prezo (ĉion inkluzive) ĉ. 2.700 GM. Interesatoj turnu sin tre baldaŭ mi, ĉar la aviadiloj rapide pleniĝos.

### Kiel donaci de ekster Germanujo al "Bona Espero"?

Multaj el vi ĝiris monon al Germanujo, paginte altajn bankkostojn. Ni estonte evitu tion laŭeble. Jen niaj proponoj:

- **Se vi estas membro, do havas konton ĉe UEA:** petu UEA, ŝovi vian donacon al la UEA-konto bone-z de "Bona Espero"
- **Se vi ne estas membro de UEA,** sed loĝas aŭ foje estas en unu el la sekvaj landoj, ĝiru aŭ pagu vian donacon al la indikita enlanda poŝta konto de UEA, nepre menciante la celon "por Bona Espero, konto bone-z":  
Belgujo: 000-1631831-97  
Nederlando: 37 89 64 Den Haag  
Svedujo: 74374-0  
Svislando: 12-2310-0 Ĝeneve  
**kontoposedanto:** Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam  
**Atentu: Se vi tiel donacas tra UEA, nepre informu nin, por ke vi pluri-  
cevu niajn cirkulerojn!**

- Se la supraj proponoj ne eblas al vi, uzu nian Germanan poŝtkonton 2033 99-465 poŝtbanko Dortmund (bankkodo 440 100 46)

Denove koran dankon al ĉiuj kaj multajn salutojn, Hedwig Fischer